

Pola Esperanto-Asocio
filio Gliwice

Kroniko



Jaro 2011

Esperanto - Sumoo 9



Samideano **HORI Yasuo** el Japanio invitas denove al Esperanto-Sumoo (*Nun du niaj klubanoj partoprenis en sumooluktado*):

"Karaj, Sumoo estas japana tradicia luktsporto. Oni organizas 6 konkursojn en la jaro, nome januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Ĉiuj luktistoj luktadas dum 15 tagoj. Mi organizas Esperanto-Sumoo-on jam 9 fojojn, koincide kun la vera sumoo-konkurso. La maniero estas:

1. Luktistoj elektas libron kaj potagan kvanton da paĝoj, kiujn ili legas.
2. Kiam ili plenumas tiun sian promeson en tiu tago, li venkas. Tiamaniere dum la 15 tagoj ili luktadas.
3. En tiu sumoo luktistoj luktas kontraŭ sia maldiligenteco kaj "okupiteco", ne kontraŭ aliaj luktistoj.

En la 7 sumoo-konkurso jene partoprenis luktistoj:

1. 2009.9: 17 homoj (ĉiuj estis japanoj)
2. 2009.11: 18 homoj (ĉiuj estis japanoj)
3. 2010.1: 23 homoj (ĉiuj estis japanoj)

Mi komencis organizi internacie:

4. 2010.3: 33 homoj (ne-japanoj 7)
5. 2010.5: 33 homoj (ne-japanoj 7)
6. 2010.5: 33 homoj (ne-japanoj 7)
7. 2010.9: 41 homoj (ne-japanoj 15)
8. 2010.11 44 homoj (ne-japanoj 15)

Kaj en tiu ĉi januaro okazis nia 9a sumoo-konkurso.

9. 2011.1: 49 homoj (ne-japanoj 22)

Kaj jen estas la rezulto:

Laŭlandaj nombroj

Japanio: 27

Francio: 5

Pollando: 3

Germanio, Finnlando, Koreio, Brazilo: po 2

Serbio, Ĉinio, Tajvano, Mongolio, Irano, Nepalo: po 4.

Laŭrezultaj nombroj

15 venkoj: 33

14 venkoj: 3

13 venkoj: 5

12 venkoj: 1

11 venkoj: 0

10 venkoj: 2

9 venkoj: 2

8 venkoj: 2

Senraporto: 1

Karaj amikoj en la mondo,

Organizi tiom multe da homoj en la tuta mondo estas malfacile, sed por mi tio estas ankaŭ ĝojo. Ĉiuj luktistoj estas kontentaj pro sia (mal)bona rezulto, ĉar ili

povas koncentriĝi al Esperanto dum du semajnoj kaj multaj finas legi promesitan libron. Se pli multe partoprenos en ĝi, nivelo de esperantistoj altiĝos kaj pli da amo al Esperanto naskiĝos. Tio kontribuos multe al la movado. En marto okazos la marta sumoo ekde la 13 ĝis la 27 de marto. Mi atendas vian partoprenon. Komence de marto mi denove sendos informon al vi."

Fabelo "Balto-Reĝo"

Nia kolego **Jerzy Walaszek** el Sosnowiec tradukis la fabelpoemon "Król Bałtyk" (Balto-Reĝo) de Anna Rudawcowa en Esperanton. Poetino Anna Rudawcowa estis la patrino de ano el nia gliwice'a klubo.



Novjara Renkontiĝo



La 29-an de januaro 2011 okazis nia tradicia novjara esperantista renkontiĝo. En ĝi partoprenis ĉirkaux 30 geesperantistoj el Gliwice kaj el najbaraj urboj. La kunvenon komencis Sankta Meso en la proksima preĝejo al Ĉiuj Sanktuloj. Poste ni ĉiuj renkontiĝis en la sidejo de nia klubo. Nia prezidanto Stanisław Mandrak salutis partoprenantojn kaj deziris ĉion bonan en Nova Jaro. Poste ĉiuj interdividis per oblatoj, diris bondezirojn, trinkis kafon, manĝis kukojn kaj kantis esperante kristnaskajn kantojn. Ni organizantoj tre dankas al ĉiuj pro alveno kaj invitas venontjare.





LA 33-a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO



Estimataj Gesinjoroj!

Proksimiĝas nova, somera periodo. Multaj personoj planas novan libertempon. Ankaŭ ni, esperantistoj planas sian liberan tempon en somero. Multe el ni memoras siajn printempojn, kiujn ni travivis en pasintaj jaroj en Mielno. Post multaj sugestoj kaj interparoloj kun organizanto de multjaraj ĈEP-oj, s-ro Czesław Baranowski mi decidis organizi kun kelkaj gekolegoj el Filio de PEA en Gliwice ĉijaran ĈEP. Ni planas inviti Vin por komuna ripozado en Mielno inter 12-22. de junio 2011 (11 tagojn). Estos granda plezuro, se Vi akceptos nian inviton kaj venos Mielnon por 33a ĈEP. Programo de ripozado grandparte dependas de Vi. Ni planas distraĵojn, kursojn, komunan kantadon, prelegojn kaj sunbruniĝon ĉe marbordo. Al tiu invito ni aldonas aliĝilon kaj aliajn informojn ligitajn kun la 33a ĈEP. Se tiu informo aktuale ne interesos Vin bonvolu transdoni ĝin al Viaj proksimuloj, konatuloj kaj gekolegoj. Kun esperanta saluto nome de organizantoj de la 33a Ĉebalta Esperantista Printempo

Stanisław Mandrak

Gliwice, dnia 23.02.2011

**Członkowie Oddziału
Polskiego Związku Esperantystów
w Gliwicach**

Zarząd Oddziału Polskiego Związku Esperantystów w Gliwicach, działając na podstawie Statutu PZE, zgodnie z § 31 pkt.2 zwołuje Walne Zebranie Oddziału na dzień **23 marca 2011 /środa/ godz. 17.00 w lokalu "Gliwickiego Centrum Organizacji Pozarządowych" w Gliwicach ul. Zwycięstwa 1 (przy Rynku, wejście od postoju taksówek)**

Proponowany porządek obrad.

1. Otwarcie Walnego Zebrania Oddziału.
2. Wybór Przewodniczącego i Prezydium WZO
3. Wybór komisji:
 - mandatowo-skrutacyjnej
 - uchwał i wniosków
4. Uwagi do proponowanego porządku obrad i przyjęcie porządku
5. Sprawozdanie Zarządu Oddziału
6. Sprawozdanie Komisji Rewizyjnej Oddziału
7. Udzielenie absolutorium ustępującym władzom Oddziału
8. Zgłaszanie kandydatur do Zarządu Oddziału i Komisji Rewizyjnej Oddziału
9. Dyskusja: aktualna sytuacja PZE, kierunki działania na kolejną kadencję, sprawy nauczania, działalność organizacyjna itp.
10. Wybory członków Zarządu Oddziału i Komisji Rewizyjnej Oddziału
11. Wybór delegata /-ów/ Oddziału na Krajowy Zjazd Delegatów PZE
12. Dalszy ciąg dyskusji
13. Odczytanie i przyjęcie uchwał
14. Wolne wnioski
15. Zamknięcie obrad WZO

Informujemy, że przed zebraniem istnieje możliwość uregulowania składek członkowskich. Będzie również możliwość nabycia wydawnictw i podręczników esperanckich.

Tago de Virinoj




Edward Jaśkiewicz kaj Helena Tylipska tradukis du versaĵojn de poetino Anna Rudawcowa. Ŝi estis patrino de Bohdan Rudawiec - esperantisto el glivice'a klubejo. Jen la versaĵoj:

Patrino

Nur sola koro, kora patrina,
Malĝojon, ĝojon kun vi dividos,
Nur bonecplena kaj ĝojinklina,
Koro patrina vin ne perfidos.
Kun vi ŝi ridos kaj kune ploros,
En bezon' urĝa helpi rapidos,
vin ekkomprenos, kulpon ignoros,
kontraŭ vin ankaŭ ŝi ne insidos.
Ŝi vin brakumos kaj donos varmon,
eĉ pli agrablan ol brullignaro
kaj dum eligos la salan larmon,
ŝi por vi helpos eĉ sen avaro.
Por vi en mondo nur ĉi estaĵo
sangon redonus ĝis gutarfino.
Do jena vorto kvazaŭ sanktaĵo
La plej belsona, vorto - PATRINO.

Esperantigis Edward Jaśkiewicz



Siberia lulkanto

Dormu miaj infanetoj.
Fore nokto grize-blua
dormas frida en la stepo.
Vartas (Ĉasas?) lupo fajr-okula...
La lun' perdis la okulojn.
En la vintro siberia
erarvagas la animoj
de perditaj filoj niaj.
Lup' ululas, korvo grakas.
Frost' glaciajn metas trepojn
Vent' ridaĉas, stepoj ploras.
Siberiaj blankaj stepoj.
Katenita ĉe la krado
suno dormas en karcerio...
Forpelitaj je vagado
kaj printempo kaj somero...
Neĝ - tempesto montras dentojn.
Vent' invitas ĝin al danco...
Sur larm - grajnoj rozariaj
diru preĝojn por bonŝanco...
Por la paĉjo en prizono,
por sufero en galero
Por de mortaj fratoj - l' ombroj
Por la panjo mallibera
Dormu miaj infanetoj (Dormu filo,
filineto)
Ne plu ploru: jen fabelo:
Inter siberiaj stepoj
sonĝu pri patruj' libera.

Esperantigis Helena Tylipska

Krystyna Grochocka (esperantistino el glivice'a klubo) tradukis tri fabelojn de Anna Rudawcowa.



Lernojaro komenciĝas



Trezoroj de Sinjorino Aŭtuno



W O U K

La 23-an de marto 2011 okazis plena kunsido de Pola Esperanto-Asocio - filio Gliwice. Kunveno iradis laŭ pli frue fiksita kaj prezentita ordo de debatoj. Dum la kunsido oni elektis la novan Estraron de nia filio.



Prezidanto kaj membrinoj de komisionoj: revizia kaj mandat-skrutinia.

Nova Estraro de nia filio



Maldekstre: Dariusz Caban, Jan Machniewski, Stanisław Mandrak (prezidanto), Danuta Źelińska, Bohdan Rudawiec, Aleksander Zdechlik



La 13-an de aprilo 2011 jaro je la 17-a horo en klubejo "Perełka" en Gliwice ĉe la strato Studzienna 6 okazos vespero de siberia poezio de **Anna Rudawcowa** (nevivanta jam poetino - siberiano). Anna Rudawcowa estis patrino de esperantisto el nia gliwice'a klubo. Kelkaj versaĵojn de poetino kun sukceso jam oni tradukis en esperanton. Ni klopodos traduki ĉiujn siberiajn versaĵojn en internacian lingvon. Ni kore invitas ĉiujn - esperantistojn kaj nesperantistojn!

Helena Typlińska esperatigis sekvontan versaĵon de Anna Rudawcowa

Al fratino vagabonda

Ho, fratini' senhejma, kiel mi vaganta
En senfino de sovaĝa tero',
Sama sorti' nin ligis kaj la vundo sama,
La dolor' simila kaj kuna sufero'.

Egale enplektas tempo senkompata
en nian vivon la tagojn identajn.
Kiun vi perdis? – la patron? l'edzon? la fraton?
Eble la filon? aŭ tutan vian genton?

Por kiu vi preĝas jam de frumateno?
Kiun pens' postkuras en malbonan landon?
Gis Arkangel', Murmansk, en glaci-gehenon
de Uralaj Montoj, en nigran, densan tajgon.

Solec, maljustaĵoj kaj tagoj almozaj,
Kiam homo vagas kvazaŭ hundo...
Ne ploru fratino, ankaŭ mi ne ploras,
Eĉ, se kor' doloras kaj sopiri' inundas.

Ne ploru fratino, ni ambaŭ senfortaj,
Kiel la folioj skuataj de vento.
Ni forgesos iam, ŝanĝiĝos la sorto
Kaj la viv'nin regalos per nova sereno.

Ne rigardu foren, tie nokt' obskura
Kaj neĝ' siberia, fridarĝenta.
Eksidu apude, fermu la okulojn,
Ni aŭskultos kune la nokton silentan.

Ĉu vi memoras siringon dolĉodoran,
Arĝentan gutobrilon de matena roso,

Pomarbon, kvazaŭ nubo rozkolora
Kaj grilojn, kiuj ĉirpis sen ripozo?

La majan veston surmetis la mateno,
Lazuran kison vi sentis sur okuloj...
Okuloj junaj, ridantaj en sereno:
Tiam vi amis mondon kaj naturon.

Ĉu vi memoras la aŭtunan tagon:
Sub niaj piedoj susuris la folioj'.
Tra ora aleo en flamanta parko
Vi promenadis ĝoje kaj sen fino.

Per splenda kiraso vestitaj –la arboj
Verŝis la oron el korboj purpuraj.
Viaj okuloj ekbrilis pro larmoj
Kaj la tristeco plenigis la koron.

Ĉu vi memoras la vesperon blankan?
Sonoris sledo kaj neĝo lante falis.
Plej karaj koroj ŝirmis vin amantaj,
Intima pac' en tiu dom' totalis.

Veneno de l' soleco vin ne voris,
Ne sulkis ĝis profunde la vizaĝon.
La familion, la patrujon vi adoris,
Kaj nun –nur ĉi siberia kaĝo.

Ho fratin! ne ploru, ĉi larmoj min doloras,
Kvazaŭ venanta el abismo kri'.
Ni ambaŭ pro la sama sort' angoras,
La sama nia ĉen' kaj la destin'.

Oni povas aŭskulti la kanton de John Lenon
prezentitan en esperanto de juna kantistino
Sylwia Lipka el urbo Knurów (apud
Gliwice).



Poezia vespero



La 13-an de aprilo 2011 okaze de 71-a datreveno de eksilito polojn en Siberion glivice'a filio de PEA organizis poezian vesperon de Anna Rudawcowa - siberiano.

En komenco de la aranĝo nia prezidanto Stansław Mandrak salutis partoprenantojn. Poste filo de poetino Bohdan Rudawiec (esperantisto el nia klubo) rakontis kun prezentado de fotoj pri la privata vivo de aŭtorino. Sekve nia koleginino Danuta Źelińska legis belegajn versaĵojn. Ŝi ankaŭ tra legis kelkajn versaĵojn, tradukitajn en internacian lingvon. Tiumaniere la partoprenantoj (precipe neesperantistoj) povas aŭdi kiel belsonas ĉi tiu poezio en Esperanto. La vespero estis varia per kantoj kun tekstoj de aŭtorino.

La kunveno estis bone organizita kaj plaĉis al ĉiuj. Organizantoj kaj alvenintaj gastoj estis kontentaj kaj konstatis ke oni devas ripeti baldaŭ la saman poezian aranĝon por alia (eble pli granda) publiko.

Ni opinias, ke ĉi tiu vespero ne nur propagandis belan, malmulte konatan poezion de Anna Rudawcowa kaj ankaŭ nian lingvon Esperanton.



Postpaska renkontiĝo en nia klubo



La 27-an de aprilo 2011 ni renkontiĝis en festa paska etoso. La kunvenon komencis tradicia interdividado per pecoj de ovo. Ovo simbolas la naskiĝantan novan vivon kaj samtempe printempon. Poste ni manĝis komune diversajn tradiciajn paskajn manĝaĵojn kaj interparolis. La kunveno daŭris ĝis fino en la agrabla etoso.



32-a Tutpollanda Esperanto Kongreso

De la 30-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011 okazis en Nowy Sącz Tutpollanda Esperanto Kongreso, en kiu partoprenis ankaŭ geesperantistoj el nia klubo. En la Kongreso partoprenis ĉirkaŭ 180 geesperantistoj el tuta Pollando kaj dekelkaj eksterlandanoj. Programo de la Kongreso estis tre riĉa kaj interesa. Okazis multaj interesaj prelegoj je diversaj temoj. Partoprenantoj povis ankaŭ rigardi multajn bone preparitajn teatraĵojn, filmojn kaj koncertojn. Okazis kelkaj ekskursoj en ĉirkaŭaĵo kaj vizitado de la urbo kun ĉiĉerono. Ĉiutage estis organizita kvizo kun premioj. Ĵaŭde kongresanoj partoprenis en Manifestacio sur Urba Placo kie okazis premiera publika kantado de Eŭropa Himno per korusoj kaj orkestro. Postagmeze ĉiuj vizitis Urbodomon, renkontiĝis kun urbestro, aŭskultis koncerton kaj estis regalitaj per Kongresa Torto. La Kongreso finiĝis per

adiaŭa bivakfajro ĉe la rivero Kamienica kun kradrostado.
 Tutpollanda Kongreso en Nowy Sącz estis tre bone organizita, dum tuta semajno regis afabla, vere familia etoso. Glivice'aj esperantistoj tre dankas al organizantoj (esperantistinoj el Nowy Sącz) kaj precipe al Halina Komar - prezidantino de PEA pro tiu belega aranĝo.



La 7an de majo 2011 en Nowy Sącz okazis Landa Kunveno de Delegitoj de Pola Esperanta Asocio. Dum la Kunveno oni akceptis raportojn de Ĉefa Estraro kaj Ĉefa Revizia Komisiono. Delegitoj balotdecidis pri kelkaj ŝanĝoj en la statuto: interalie oni translokigis la sidejon de PEA en Varsovion. Delegitoj elektis novan Ĉefan Estraron de Pola Esperanto-Asocio. Ili elektis ankaŭ Ĉefan Revizian Komisionon: kies 2 novaj anoj estas ankaŭ anoj de nia glivice'a filio: Stanisław Mandrak (prezidanto) kaj Aleksander Zdechlik.

Nova Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio



Ĉantorio 2011

La 3-an dimanĉon de junio estas okazo renkontiĝi intrnacie sur lima monto Ĉantorio en montaro Silezia Beskido. La kutimo renkontiĝi daŭras jam delonge. Mi supozas ke unua renkontiĝo okazis en la jaro 1926. Do, ĉijare estis ronda datreveno, 85-a jubileo sed mi povas erari.

Kiel dum kelkaj antaŭaj jaroj, ĉijare mi ankaŭ decidis partopreni la renkontiĝon, kvankam vetero unu tagon antaŭe ne estis konvena por turismi. Pluvis kaj estis malvarme.

Neatendinte je la 19-an de junio je la 5-a horo matene ne plu pluvis kaj kiam mi envagoniĝis je la 6-a horo postpluva resto estis videbla nur per flakoj surstrate. Stacidomonon Ustroń Polana mi atingis sufiĉe frue kiel sola esperantisto. Videbla de la stacidomo telfero ankoraŭ ne moviĝis. Plena de antaŭtimoj, ĉar mi ne estis preparita por plena grimrado, mi alproksimiĝis al stacidomo de la terfero. Tie okazis ke la telfero funkcias kaj eĉ biletoj estas promociie malmultekostaj. Restis nur uzi la telferon kaj iom grimpeti por troviĝi en kabano Ĉantoryja.

Por mi neatendinte, ĉar neniam tio okazis antaŭe, mi estis unua esperantisto en tiu loko. Surpinte varmeco estis nur 12 gradojn. Kompare kun antaŭaj tre varmaj tagoj la temperaturo estis akceptebla.

Trinkante ĉeĥan bieron Radegast mi atendis sekvontajn esperantistoj. Unuaj venis ĉeĥoj kun sinjoro Nemeč el Ostravo. Poste la kabanon atingis poloj, sekvontaj ĉeĥoj kaj slovakoj. La slovakon grupon gvidis Jan Vajs kaj ĉeĥan teamon ornamis eksa ĉeĥa ambasadoro Jaroslav Suchanek.

Oficiale malfermis la renkontiĝon pol-ĉeĥa geedza paro Adam kaj Markéta Wilkus kiuj proponis doni al ĉiuj voĉon por ke partoprenantoj sin prezentiĝu. Post tio, ni iomete kantetis. Komencis slovakino kun slovakaj kantoj poste kantis ĉeĥoj per ĉeĥa kanto. Kiam estis vico por poloj, nia kolego el Sosnowiec Jerzy Walaszek kantis opervoĉe kaj esperante neapolitanan kanton "O sole mio".

Post lia kantado tuta kabano aplaudis interalie neesperantistoj. La kantisto promesis ke venontfoje li faros recitalon. Fine deklamis poezion de knabinoj el Dąbrowa Górnicza kaj ili ricevis ankaŭ aplaŭdojn.

La tutan renkontiĝon filmis sinjoro Adam Wilkus kaj ni esperantistoj babilis internacie manĝante kaj trinkante. Fine, antaŭ la kabano ni faris komunan foton kaj poste partoprenantoj disiris, ĉiu laŭ sia vojo.

Nunjaran renkontiĝon partoprenis 5 ĉeĥoj, 5 slovakoj kaj 11 poloj. Do, entute estis 21 personoj. La renkontiĝo pasis en vera esperanta etoso.

raportis Aleksander Zdechlik





Mia somera aventuro

Dum ĉijaraj ferioj, mi travivis kelkajn agrablajn avantaĝojn. Jen la unua. Dum mia restado en ripozloko Mielno okazis LA 33-a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO, kiun mi persone ne partoprenis, pro la jam pli frue mendita ĉambro en loka hotelo. Tamen mi havis feliĉon kontaktigi kun esperantistoj kaj kun la internacia lingvo. Ĉeforganizanto de Esperanta Feriado Stanisław Mandrak, malgraŭ multaj diversaj okupoj ligitaj kun gvidado de sia propra entrepreno, organizis ankaŭ por neesperantistoj, vokalistan koncerton de itala amatora kantisto, kantata esperantlingve mondfamajn kantojn. Temas pri Rovere Emanuele, kiu ne nur kantis sed mem esperantigis tekstojn de kantantaj kanzonoj. Koncerto okazis en unu el la plej modernaj hoteloj en Mielno - "Unitral". Emanuele per la vokalista reĉitalo fascinis partprenantojn kaj reklamis Esperanton. Dum la koncerto de belaj kantoj kaj muziko, kelkaj paroj dancis, ĉar la kreita etoso estis vere agrabla kaj simpatia. Atendata celo tute sukcesis. Post la koncerta vespero partoprenantaj - hotelgastoj ekinteresiĝis pri Esperanto, kaj pri diskoj kun prezentitaj bonkvalitaj muzikaĵoj. Sinjoro Mandrak pollingve klarigis motivojn kiuj kaŭzis, ke Emanuele fariĝis esperantisto kaj poste esperanta kantisto kaj kia estis lia celo. Pligranda parto de hotelaj gastoj estis germanoj, scivolemaj pri neŭtrala, internacia lingvo Esperanto kaj pri tio ankaŭ demandis min en sekvontaj tagoj dum mallongaj personaj kontaktoj kaj interparoladoj, precipe dum komunaj manĝaĵoj. Tial jam ĝis la fino de mia restado en Unitral - hotelo, mi estis devigita respondi demandojn rilate kun Esperanto kaj ankaŭ kun Emanuele, kiu senpreofite oferiĝis al popularigado kaj reklamado de Esperanto. Post la koncerta evento Emanuele personefariĝis por mi mia konatulo kaj simpatia amiko.

raportis Bogdan Rudawiec



Someraj esperantaj renkontiĝoj

Julie kaj aŭguste ni renkontiĝas kaj babilas esperante sur glivice'a urboplaco en kafejo ĉe urbodomo.



Hungaraj geesperantistoj en Gliwice

Grupo de hungaraj geesperantistoj, partopranantoj de Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, revenante hejmen decidis viziti kelkajn lokojn en nia lando. En Gliwice kun granda interesiĝo ili pririgardis faman radiostacian maston, ofte nomata Gliwice'a Eifel Turo. Sinjoro Stanisław Mandrak rakontis pri radiostacia historio kaj respondis al diversaj demandoj. Poste, antaŭ forveturo niaj gastoj vizitis Katedralo de Sanktaj Petro kaj Paulo. Sekvontajn lokojn kiujn ili intensis viziti estos Oświęcim kaj Krakovo.

raportis Bogdan Rudawiec

Memoroj el Kopenhago

Tri geesperantistoj el glivice'a klubo partoprenis **la 96-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago**.

La 22-an de julio ni trio pe veturis per pramo de Świnoujście al Ystad, kaj poste per buso al Kopenhago. Sen problemo ni atingis la kongresejon "Bella Center", kie ni ricevis kongresajn materialojn kaj ŝlosilon al nia loĝejo en Studenta Domo. Studenta Domo troviĝis malproksime de la kongresejo, sed estis facile atingebala per metro kaj S-trajno.

Vespere ni revenis al kongresejo, kie okazis Movada Foiro, kaj kie ni renkontiĝis kun geamikoj el diversaj landoj. Dimanĉe okazis la solena inaŭguro, kaj vespere nacia arta vespero en fama parko "Tivoli". Lunde okazis kongresa balo.

Dum la tuta semajno ni partoprenis diversajn prelegojn, kursojn de Esperanto, kurson de dana lingvo, koncertojn, teatraĵojn, filmojn ktp. Ni ankaŭ multe parolis esperante kun novaj kaj malnovaj geamikoj.

Preskaŭ dum la tuta semajno la vetero estis malbona, ofte pluvis kaj ventis.

Feliĉe merkrede, kiam estis ekskursata tago, vetero pliboniĝis. Ni kun nia amikino el Germanio dum la tuta tago vizitis Kopenhagon.

Post la fino de la Kongreso ni restis ankoraŭ du tagojn en Kopenhago. Ni ŝanĝigis nian loĝejon kaj ekloĝis en "Danhostel" proksime al la kongresejo. Dum ĉi tiuj tagoj estis tre bona vetero. Ni promenis tra la urbo kaj ekkonis multe da interesaj objektoj de dana ĉefurbo.

Malgraŭ malbona vetero dum la Kongreso regis varma etoso. Nia restado en Kopenhago estis tre agrabla kaj restos longtempe en nia memoro.

raportis Krystyna kaj Natalia Grochockie



Feriado en Szczawno Zdrój

Ekde la 6-a ĝis la 14-a aŭgusto 2011 Silezia Esperanto-Asocio organizis tradicion Esperantistan Feriadon en Szczawno Zdrój. Mi jam duan fojon partoprenis la aranĝon.

Szczawno Zdrój estas belega kuracloka urbeto situanta apud urbo Wałbrzych kunligita kun Lodoviko Zamenhof. Nia fama reĝisoro partoprenanto de la feriado Roman Dobrzyński trovis domon en kiu loĝis nia majstro. Organizantoj organizis riĉan programon. Ĝenerale antaŭtagmezo estis destinita por lerni kaj perfektigi konon de la lingvo internacia. Post tagmanĝo estis tempo por ekskursi en la ĉirkaŭaĵo. Do, ni vizitis la kurorton Szczawno Zdrój, urbon Wałbrzych, palmejon, kastelon Książ (tria kastelo en Pollando). Tuttaga ekskurso al ĉirkaŭaĵo de urbo Jelenia Góra permesis al mi konstati ke tie estas multe da belegaj palacoj kaj interesaj, laŭ arkitekturo, objektoj. Ĝis nun mi tute pri ili ne scis kvankam dum infana tempo mi sufiĉe ofte libertempis tie. La ekskurso komenciĝis en urbo Kowary kie ni vizitis Parkon pri miniaturoj. La miniaturoj montras la palacojn kaj la objektojn. Poste ni vojaĝante perbuse vizitis kelkajn objektojn. En Szczawno Zdrój ne nur estas bele kaj ankaŭ oni povas tie amuziĝi. La urbo ofertas diversajn kulturajn programojn. Feriadanĝoj ĉijare povis spekti en la urba teatro folklorajn ensemblojn el Meksiko, Kolumbio kaj Ukrainio. Vespere estis ebleco danci en diversaj restoracioj.

Pollando estas vere bela kaj Malsupra Silezio estas inda por reveni.

raportis Aleksander Zdechlik



Interesa ekskurso

Ekde 17 ĝis 24 septembro 2011 okazis ekskurso por seminarianoj de GRUNDTVIG projekto, kiun organizis eksprezidantino de PEA Halina Komar. En la ekskurso partoprenis ankaŭ esperantistoj el nia glivice'a klubo. Dum la vojaĝo ni unue alvenis al Herzberg - Esperanto-Urbo. Tie ni vizitis kastelon, esperanto-centron, urboplacon, renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj kun urbestro. Sekve ni vojaĝis al Antverpeno, kie okazis kunveno en sidejo de esperanta klubo. Lokaj esperantistinoj montris al ni la plej interesajn lokojn en la urbo. Poste ni iris al Bruselo, ni vizitis la urbon, European Parlamenton kaj renkontiĝis kun bruselaj esperantistoj. La lastan urbon kiun ni vizitis esitis Berlino. Tra Berlino gvidis nin germana esperantisto kaj montris multajn interesajn lokojn. Fine ni vizitis muzeon "Pergamon". La ekskurso estis tre interesa, dum ĉiuj tagoj regis tre afabla etoso. Ni opinias, ke ĉiuj partoprenatoj estis tre kontentaj de ĝi.





Kiel en pasintaj jaroj, novembre en Gliwice ni organizis aranĝon **GRUPE**. Ĝi estis jam la 15a aranĝo GRUPE-15. Nia aranĝo daŭris ekde la 11a ĝis la 13a de novembro 2011 en la sama loko kiel dum pasintaj jaroj.

En la kunveno partoprenis esperantistoj el tuta Pollando.

Dum la solena malfermo nia klubano Aleksander Zdechlik kore salutis la partoprenantojn kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon en Gliwice.

Vendrede kaj sabate ni partoprenis en multaj prelegoj kaj en aliaj programoj.

Dum la aranĝo prelegis:

- Jerzy Walaszek - "Esperanta libro-mondo"
- Bohdan Rudawiec - "La poezio de deportitoj"
- Barbara Pietrzak - "Situacio en UEA kaj en PEA, retradio"
- Danuta Ŝelińska - "Rememoroj pri Afriko"
- Stanisław Mandrak - "Polico kaj esperanto"
- Stanisław Mandrak - "Interneto ne nur babilejo"

Aliaj programoj:

- Loterio kun premioj gvidata de Marian Wolny.
- Vespero en opereta etoso prezentis grupo el Universitato de Tria Aĝo el Jastrzębie Zdrój.



Vendrede okazis ekskurso kun gvidanto al malnova juda tombejo en Gliwice. Sabate ni vizitis muzeon en Piasta Kastelo kaj kun gvidantino ni promenis tra urboplaco kaj tra malnovaj stratoj en ĉirkaŭaĵo.

Nia kunveno finiĝis dimanĉe je la 12-a horo.

Dum la GRUPE 15 regis agrabla estoso, krom la programo ni havis okazon por babili, konatiĝi kaj amikiĝi. Ni esperas, ke la partoprenantoj estis kontentaj de nia rendevuo.

Memoraĵoj okaze de GRUPE 15





La 152a datreveno de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof



La 14an de decembro 2011 ni renkontiĝis por omaĝi la 152an datrevenon de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. La kunveon komencis prezidanto de nia klubo Stanisław Mandrak. Li salutis ĉiujn partoprenatojn. Poste ni rigardis la prezentadon pri vivo de Ludoviko Zamenhof kaj pri lia fama verko. Sekve nia gasto el Jaworzno Jerzy Kilijański montris belajn fotojn kaj rakontis pri sia restado en Japanio. Al Japanio invitis lin japanaj esperantistoj. Dank'al Esperanto nia amiko vizitis kaj ekkonis malproksiman kaj interesan landon.

En la fino de nia kunveno ni dankis al nia majstro ne nur pro la lingvo kaj ankaŭ pro la amikoj kiujn ni havas en la tuta mondo.



**GAJAN KRISTNASKON
KAJ FELIĈAN
NOVAN JARON 2012**

**DEZIRAS
GLIVICE'AJ
ESPERANTISTOJ**